

Internacia Lingva Komunikado (ILK)

Studenta Scienca Esperanto-Rondo de Lodza Universitato (Pollando) komune kun la tiea Laborejo de Hindeŭropa Vortaro ĉe Katedro de Klasika Filologio organizis la 8-an konferencon ILK sub la honora protekto de Pola Instituto pri Internaciaj Aferoj.

La konferencon okazintan dum 20-23.11.1986 partoprenis 56 sciencistoj, specialistoj kaj studentoj. Oni prezentis 25 referaĵojn pri interlingvistiko, kundenpendeco inter ekkonproceso kaj lingva komunikado, pri problemoj ligitaj kun kreado de Esperanto-leksiko, pri modifoj de mondbildo kiel rezulto de interreta komunikado, pri etnolingvo kaj lingvo universala, pri aspektoj de interkomunikiĝado, pri multilingvismo kaj ILK, pri idiomoj en la lingvo Esperanto, kaj pri kelkaj aliaj problemoj.

Enkadre de ILK okazis ankaŭ Hindeŭropeistika Sesio kun referaĵoj pri la loko de la hindiranaj lingvoj en la hindeŭropa familio, pri la hindeŭropaj prepozicioj, pri la lingvo de Man-insulo, pri problemoj de lingvaj kontaktoj surbaze de la mara leksiko de germanoj, pri la lingvo albana, pri la sunkulto de romanoj, pri lingvaj rilatoj en Eŭropo dum la 16-a jarcento, pri klasifiko de la hindaj lingvoj, pri la historio de la hindeŭropeistika leksikografio, k.a.

La konferencanoj ricevis presitajn materialojn:

ILK-5, red. T. Ejsmont, 165 p. Lodzo 1986.

ILK-6, red. T. Ejsmont, 239 p. Lodzo 1986.

Oni decidis, ke la 9-a konferenco ILK okazos dum 19-22.11.1987 kaj traktos jenan problemaron:

- histori-kompara analizo de la fenomenoj kaj procesoj de ILK
 - soci- kaj psiĥo-lingvistikaj aspektoj de ILK
 - 100 jaroj de ekzisto kaj disvolvo de Esperanto, pritaksoj kaj prognozoj.
- Pli detalaj informoj ĉe: *Tadeusz Ejsmont, Bartoka 1/49 - PL-92-547 Łódź*
Pollando

Komputada Baza Terminaro

Tiun ĉi titolon portas praktika verko aperinta en 1985. La kunaŭtoroj estas: *Gerhard Kalckhoff, Anthony C. Pick* kaj *Auguste Broise* (†). Eldonis ĝin: *Alfred Shubert, Linguistisches Bureau, München.*

La 52-paĝa broŝureto konsistas el antaŭparolo, el dankesprimo al la kunlaborintoj (*N.C. Austin, P.A. Buinsters, M.E. Falla, R. Haferkorn, H.H. Maas, K. Schlüter* kaj *E. Sonnenfeld*), el tre koncizaj biografietoj de *Kalckhoff* kaj *Pick*, el laŭalfabeta difin-vortaro en Esperanto kun la termintradukoj en la angla, germana kaj franca (sume 369 kapvortoj) kaj fine el la nacilingvaj alfabet-listoj.

Ĝenerale dirite: Utilega, oportune manipulebla helpilo, kiu devus lokiĝi en libroŝranko de ĉiu esperantisto. Ĉar la prez-indiko mankas, ni informiĝis, ke la terminaro estas aĉetebla por 9,80 germanaj markoj.

La sekvantaj kritik-vortoj neniel difektu la supre diritan laŭdon: Al sinoptikeco de la terminaro ordigita laŭ la Esperanto-alfabeto kontribuis iamaniera grafika distingo inter la kapvortoj bazaj, ekz. “2 adreso” kaj la koneksaj, ekz. “3 absoluta adreso”. Eble sufiĉus, se la koneksaj estus forŝovitaj iomete dekstren. Tio certe plirapidigus la serĉadon.

Tajp-eraroj malmultas, ekz. 27 Ekzistas, 58 integra, 175 diĝit.

Kaj nun pri unuopaj terminoj, evt. difinoj:

25 centra aparato estas difinita helpe de procesoro (262), centra memorilo (200) kaj regilo (286). Tamen, en la difinoj de ĉi referencitaj kapvortoj denove aperas la nocio “centra aparato”. Do, jen tipa ekzemplo de la t.n. “sorĉa cirklo”.

27 periferia aparato. En la difino estas substrekende, ke temas pri establaĵo efektive periferia. Ekz.: Ekstera aparato ligita al regilo.

33 asemblilo. Sendube pli internacie aspektus **asemblo** (angle *assembler*, ger-

mane *Assembler*, france *assembleur*; la *er* kaj *-eur* estas ja ekvivalentaj al la latina *-or*). Notindas ankaŭ tio, ke KBT ne registras la bazan verbon asembli, sed jes la verban substantivon asemblado (35).

47 binarkodo de dekumnombro. La -um-terminoj ne tre bonŝancas: 284 pseŭdodekuma, 316 deksexuma, 317 duuma, 318 okuma. Kial ne apliki la respektivajn internaciaĵojn, jam tradicie hejmajn en Esperanto: decimala, heksadecimala, binara, oktala? Cetere, binara normale aperas sub 46. Oni serioze konsideru, ke la -um-vortoj svarmas jam tro multe kaj ke ili apenaŭ povas esti kontentige elvokivaj, ĉar la sufikso -um- interpretiĝas plursence.

49 bitoko. Unuavide, tiu ĉi termino efikas iom rebuse (same: 29 aparatbitoko), ĝis oni ekkonscias, ke temas pri bit-oko. Estas verŝajne, ke multaj aŭtoroj preferos la internaciajn **okteto** kaj **tetrado** (por 50 “bitokvaro”).

63 datenoj. La termino “dateno”, laŭ la KBT-antaŭparolo, “esprimas tute alian ideon ol la jam ekzistanta radikvorto **dato**”. Nu, sincere dirite, tiu ĉi aserto validas nek etimologie, nek semantike. “Dateno” estas formita el la latinverba radiko *dat-* (el la supina aŭ pasivparticipa formo *datum* = donita, de la verbo *dare* = doni) plus la ĝermana pluralfinaĵo *-en* (= -j). Internacie konsiderate, la nove elpensita radiko “daten?” do ne povas esprimi tute alian, sed male, tute saman ideon. Sufiĉas ja legi sur p. 11 la nacilingvajn ekvivalentojn: angle *data* (plurala formo de la latina *datum*), germane *Daten* (denove kun la sama latina radiko, *dat-*), france *données* (= donitaĵoj!). El ĉio ĉi sekvas logika konkludo, ke oni devus plivastigi la laŭfundamentan signifon de **dato** ekster la donitaĵo esklude kalendara. Tiel oni unubate forigus kaj la superfluan neologismon “dateno”, kaj samtempe la nedezirindan diskrepancon de **dato** kun la komprenado internacia. Nature, ankaŭ la termino **data banko**, tre similanta la anglan ekvivalenton *data bank*, estas multe pli akceptebla ol “datenar-banko” (90). Ĉi-okaze, laŭ la principo de sufiĉo, ne estas necese akcenti, ke temas pri pluraj eĉ multaj datoj (dataroj) en la banko. Ĉiu ja tuj komprenas, ke data banko estas fakte datar-banko.

69 varieblaj. Naskiĝas la demando, ĉu temas pri eraro tajpa (variablaj) aŭ gramatika (variiĝeblaj).

76 “datena” fininstalaĵo. Same kiel okaze de 27: Ekstera aparato ...

158 komputilo. Jam antaŭparole oni mencias, ke la PIV-aĵon “komputero” ne akceptis granda plimulto de fakuloj. Tamen, iom strange impresas la fakto, ke unu el la KTB-aŭtoroj, estante la vicdirektoro de Terminologia Centro,

internacia normiga institucio komuna al ISAE kaj AE (Akademio de Esperanto), ne lojalas koncerne la TC-rekomendon bazitan sur eksterordinare serioza kaj konscienca enketo, nome la rekomendon pri la termino **komputero**. Tiom pli mirinde estas, ke eĉ pluraj fakuloj, ne senpere kunlaborantaj kun TC kaj SR, jes agnoskas ĉi tiun plej taŭgan terminon. Kial komputero estas la plej taŭga termino? Ĉar ĝi harmonie koheras kun la latindevena, do vaste internacia vortfarado, cetere evidenta ankaŭ en KBT. Bv. kompari kun la registritaj -(at)oroj: 16 akumulatoro, 100 emulatoro, 113 generatoro, 164 koncentratoro, 224 monitoro, 227 multipleksoro, 244 operatoro, 262 procesoro, 304 sektoro, 312 simulatoro, 366 vektoro. Precipian aplaŭdon merita KBT tial, ke ĝi akceptis la terminon **procesoro**, evitante la mallertaĵon “procezilo”, kiu aperis ĉe iuj aŭtoroj hungaraj.

176 konzolo. Ĉu temas pri intenca (homonim-evita) fonetika misformo de la franca kaj angla *console*, aŭ ĉu pri metaforo al la PIV-a **konzolo**?

191 “makro”. Jen vorto impresanta slangece. Ĉu **makro-instrukcio** ne estus pli taŭga? Ĉar la pseŭdoprefikso *makro-* aperas en multaj sciencoj, kio okazus, se ne sole komputoristoj, sed ankaŭ alifakuloj procedus analoge? Inter la petrologoj, ekz., tute normale aplikiĝas la slangaĵo *makro* por makroskopia priskribo de rokaĵo-specimeno... En ĉiutaga komunikado ĝi estas bone tolerebla, sed en seriozaj sciencaj tekstoj nepre evitinda. Jen ofertas sin komparo kun analoga koncizigo *dia*, kiu ja ne koncernas dion, sed diafanan foton, diabeton k.t.p.

230 binara nombro. La difino estas nesufiĉa: en ĉiu nombrosistemo estas la ciferoj 0 kaj 1.

243 operaciendo. Jen diverĝo de l’ internacia uzo (angle *operand*, germane *Operand*, france *opérande*), dum **operatoro** (244) bone harmonias kun ĝi (angle *operator*, germane *Operator*, france *opérateur*). Kio do malhelpas uzi por (243) la simplan **operando**?

254 “procezrego”. Kaj okulon, kaj orelon batas la fonetika disharmonio inter procesoro (262) kaj “procezrego”. Ĉu vere ne sufiĉas la radiko proces- ankaŭ “eksterjure”?

301 restartrutino, 302 suba rutino. Nepre devus esti **subrutino** (angle *subroutine*, germane *Unterprogramm*, france *sous-routine*).

367 videbligilo. Katodradia tubo ne estas la unusola fizika principo, aplikata por elmontrado de signoj.

Václav Hník kaj Josef Kavka